

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 64-a radioprelego, 1964.02.19 & 2

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la vivo en Esperantujo ! Vi aŭdas Claude Gacond.

Multaj geaŭdantoj skribis. Ni hodiaŭ malfermu nian leterujon por saluti niajn amikojn kaj citi el iliaj poŝtkartoj kaj leteroj. Sinjoro Lennart Aberg el Skövde (Svedujo) skribas laŭde : « Kun atento mi ĉiun semajnon sekvas viajn programojn en la internacia lingvo. La varieco de temoj kaj ĉiam saĝa elekto donas al viaj programoj elstaran pozicion inter la programoj, kiujn mi aŭskultas. » (Fino de la citaĵo.) El tiu norda lando venis alia letero. Sinjoro Yvar Mattsson el Enskede (Svedujo) skribas : « Kiam mi hodiaŭ serĉis radiostacion, mi subite ekaŭdis vian stacion kaj kun intereso aŭskultis paroli pri Edmond Privat kaj lia libro *Interpopola Konduto*. (Fino de la citaĵo.) Ni salutas tiun novan aŭdanton kaj esperas ricevi de li novajn sciigojn pri la aŭdebleco de niaj elsendoj en lia fora lando.

El ambaŭ Germanioj venis mesaĝoj. Sinjoro Franz Fischer el Magdeburg (Orienta Germanio) diris sian interesiĝon pri niaj diroj koncerne la esperanto-grupojn. Sinjoro Bruno Gahler el Glinde apud Hamburgo (Okcidenta Germanio) skribas: “Esperanto allogas aŭskulti Svislandon kaj ofte oni restas poste sur la ondo kaj pluen aŭskultas en la germana lingvo. (Fino de la citaĵo.) Tiu germana samideano ŝatis niajn elsendojn pri la tro rapide mortinta latinisto Charles Ecabert, kiu esperantiĝis kaj rapide famiĝis en Esperantujo kaj pri la laboro de UN en Kongo. Ni ŝatas scii, kiuj prelegoj interesas niajn geaŭdantojn. Fraŭlino Nora Hartwich el Frankfurt am Main (Okcidenta Germanio), kiu partoprenis la skirestadon en Adelboden, anoncas al ni, ke ŝi finfine sukcesis kapti niajn elsendojn.

Fidelaj aŭskultantoj el Anglujo regule sendas al ni poŝtkartojn kun mencio de la aŭditaj prelegoj. Sinjoro Cather el Torquay koncerne la prelegserion pri Edmond Privat diras : « Ni ege bezonas tiajn inspirojn. » Kiel lia samlandano sinjoro Johano Brownlee el Hexham, li diras sian kontenton aŭdi paroli pri la Unuiĝintaj Nacioj.

En Clermont-Ferrand (Francio) ni havas tre fidelan aŭskultanton. Sinjoro Gaston Vidal sendis al ni plej diversajn dokumentojn, inter kiuj, interesan libreton verkitan de Lavarenne, kies temo tre najbaras la penson de Edmond Privat. Ni certe dum tiu ĉi jaro citos el tiu libro titolita *Ĉu daŭra paco eblas ?* Sinjoro Gaston Vidal aktivas en la rondoj de la Muelejoj de la Metilernantoj, pri kiuj ni raportis pasintjare. En tiuj rondoj formiĝas utilaj internaciaj kontaktoj pere de konstruiga laboro : rekonstruo de ruinigitaj muelejoj, kiuj servas poste kiel feri-loko. Esperanto estas unu el la multnombraj lingvoj parolataj en la labor-restadoj de la metilernantoj. Dank'al la regula ricevo de la gazeto *Le Moulin des apprentis* ni povos foje denove rakonti al vi pli detale pri la bela laboro de tiuj pac-konstruantoj.

Dank'al regula ricevo de informado ni ankaŭ konatiĝas pri la laboro de aliaj pac-konstruantoj. Temas pri la laboro de la edukistoj, kies klasoj kunlaboras en la kajero-interŝanĝo de *Graĵnoj en Vento*. Sinjoro Marcel Erbetta, la estro de tiu interlerneja korespondado, ricevis apogon de UEA pere de mona subvencio. Ni esperas, ke Unesko baldaŭ agos same por helpi instruiston, kiu povus entrepreni multe pli da laboro por la disvastiĝo de nia lingvo en la lernejojn, se li ricevus regulajn financajn helpojn. Vi aŭdis lastjare intervjuon de la estro de *Graĵnoj en Vento*, kaj certe tiun ĉi jaron reaŭdos pri tiu movado, kiun ni konsideras kiel unu el la plej belaj floroj de la esperantismo.

Ni rezervis por la fino de nia elsendo leteron de sinjoro Pal Balkanyi el Budapeŝto (Hungario), kiu, responde al nia elsendo pri la vivo de la esperanto-grupoj, rakontas pri la vivo de la Budapeŝta Esperanto-Grupo Konkordo. El tiu letero ni tiras kelkajn informojn, kiuj certe interesos multajn geaŭdantojn :

« Regulaj kunvenoj de la Esperanto-Grupo Konkordo okazas ĉiulunde. Ĉiumonate la programo de tiuj vesperoj estas diskonata per multobligita informilo. Kio okazas dum tiuj

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 64-a radioprelego, 1964.02.19 & 2

lundaj vesperoj : prelegoj pri gravaj personoj, pri datrevenoj, pri eminentaj esperantistoj, poetoj kaj verkistoj el nia movado ; amikaj vesperoj, kiuj celebras aliajn popolojn, tio ofte en ĉeesto de gasto el tiu lando : tiel estis celebrataj la popoloj bulgara, ĉeĥoslovaka, germana, islanda, franca, pola, soveta, novzelandaj. Aliaj vesperoj estas dediĉitaj al diskuto de elektitaj temoj aŭ al junularaj vesperoj. Ofte la junuloj ricevas taskon. Ili devas prezenti raporton pri persono, datreveno aŭ poemo. Kelfoje d-ro Kalocsay, la prezidanto de tiu esperanto-grupo, partoprenas la kunvenojn. Estas tiam ĝuiga vespero por ĉiuj kun prezento de la verkoj de poetoj kaj verkistoj esperantaj. Sinjoro Baghy, kiu estras alian grupon, ankaŭ de tempo al tempo vizitas la grupon Konkordo. » (Fino de la citaĵo.)

Nia espero estas, ke multaj aliaj esperanto-grupoj imite al la grupo budapeŝta aranĝu regulajn allogajn vesperojn kulture altnivelajn. Alia espero estas, ke foje la celebrata popolo estos la svisa. Se la distancoj estus malpli longaj, ni volonte vizitus gaste tiun vesperon.

En la fino de sia longa letero sinjoro Pal Balkanyi instigas nin foje pritrakti la temon de la neologismoj. Ni do obeos, kaj tio venontsemajne jam.

Kiel vi vidis, nia leterkesto estis plena de interesaj mesaĝoj. Nun ĝi tute malpleniĝis, sed ni estas certaj, ke tre baldaŭ alfluos novaj mesaĝoj, en kiuj ni plezure relegos kelkajn nomojn, kiujn ni komencas bone koni kaj ankaŭ kelkajn novajn nomojn.

Vi aŭdis Claude Gacond, kiu malfermis la leterkeston de Radio-Svislando kaj parolis pri la vivo en Esperantujo !

Ĝis reaŭdo !

-oOo-